
## SOLVO

La respondo de la lasta kvizo estas

**BERLIN**



## KVIZO

**Ĉu vi bone konas Eŭropon?**



Mi estas ĉefurbo proksimume 2,000 kilometrojn for de London, 1,020 de Berlin, kaj 900 de Oslo.

**Kio estas mia nomo?**

skype™

Se vi deziras partopreni niajn retkunvenojn pere de Skype, vi devas unue ligi kun unu el la anoj, kiu estras la kunvenon. Vi tion faru per la entajpo de la nomo...


aŭ **Roy Simmons**
aŭ **Marko Drejko**

kaj la sendo de mesaĝo kiu petos kunligon. Ni respondos, kaj vi estos kunligita. Ne ne devas fari tion denove.

Poste, kiam vi deziras partopreni, voku unu el ni kaj ni aldonos vin al la konversacio.

**Bonŝancon!**

## SOMERA IDILIO



Mi envias la
limakon,
Kiu trotas
al...parcel',
Kie limakin'
atakon
Sopiregas sub
sitel'!
Sub sitelo am-ofero
Estas ebla dum somero,
Ne tedus min senombra voj',
Se sub sitelo
logus ĝoj'!



Raymond
Schwartz
"La Stranga
Butiko."


Orientlondona
LONDON E

# *Orientlondona Esperanto*

### *(East London Esperanto)*

## *Bulteno/Newsletter*

*http://www.greenrats.org.uk*

*Majo ĝis junio 2015 May to June*

*Antaŭe la Ilforda Esperanta Societo, originale fondita en junio 1904*
*Formerly the Ilford Esperanto Society, originally founded in June 1904*


## INTERESA KUNVENO EN BRENTWOOD

Mardon la 10an de aprilo kunvenis ĉe Kimie Markarian, en Brentwood, kvin el nia grupo plus vizitantino de la Korea Respubliko, Min Min, kaj nova samideano Cristian Severina, originale de Argentino, sed nun loĝanto en Waltham Abbey.



Kimie preparis, kiel kutime, bonegan manĝaĵon, kaj ni havis ege interesan vesperon babilante kaj manĝante, kune kun iom da vino. En la unua foto Min Min, Kimie, Mark Drake, Daniel Hayon kaj Christian Severina manĝas, dum Roy Simmons fotas. En la dua Min Min diskutas kun Arturo Prent dum Kimie kaj Mark rigardas, kaj en la tria Min Min montras al ni, ĉiuj la korean alfabeton, kaj kiel uzi ĝin. Estas interese noti, ke la lingvo ne uzas piktogramojn, do eblas traduki proprajn nomojn, ktp, kaj skribi ilin en la korean lingvon.





Ni ege ĝuis la vesperon, kiu daŭris post la deka, kaj dankas al Kimie pro ŝia gastamo. Nuntempe estas malofte, ke ni renkontas samideanojn de aliaj landoj, sed ni ne maltrafis la ŝancon ĉi-foje. Min Min rememorigis nin, ke ni nun havas kontaktulon en la Korea Respubliko, kaj ke la Universala Kongreso 2017 okazos tie, en Seoul, la ĉefurbo. Jen defio por ni partopreni, ĉu ne?


*Sekretario: 'Esperantujo', 12 Packard Place, Bramford, Suffolk, IP8 4HA,*
*Tel. 01473 461346 , retadreso: rokeby@globalnet.co.uk*

# Kunvenoj en majo kaj junio

**mardo la 5a de majo**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**11a de majo/May 11th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 19a de marto**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**25a de majo/May 25th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 2a de junio**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**8a de junio/June 8th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**16a de junio/June 16th**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**mardo la 22a de junio**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**30a de junio/June 30th**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

# May and June Meetings

**Grupkunvenoj/Group Meetings**
**okazas 7.30 - 9.00 ptm**
**pere de la interreto kaj Skype**
**Novaj partoprenontoj kunligu antaŭe** kun **Marko Drejko** aŭ **Roy Simmons** por **esti en la grupo.**

**Studrondo interreta**
**(nur Esperantlingve)**
**okazas 8.00 - 9.00 ptm**
**pere de la interreto kaj Skype.**
**Ni legadas** 'La Mastro de l'Ringoj,"
de J R R Tolkien (tradukita de W Auld)

**When they occur, Beginners' Groups take place at a mutually convenient time and place.**

LILLE2015 espéranto

En 1905 okazis la 1a Universala Kongreso de Esperanto en la nordfrancia urbo Boulogne-sur-Mer (Bulonjo-ĉe-Maro).



En 2015 okazos la 100a Universala Kongreso de Esperanto en Lille (Lillo), la nordfrancia ĉefurbo, kun tuta tago en Boulogne-sur-Mer !

La temo estos : « lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj ».

**Por pli da detaloj:**

http://www.lve-esperanto.org/lille2015/

## LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

**La Londona Esperanto-Klubo** kunvenas ĉiuvendrede ĉe la Irlanda Centro, Camden Square. La programo komenciĝas je la 7.15 ptm, sed estas ŝanco renkontiĝi en la drinkejo antaŭe por babili.



La Londona Klubo estas fondita en 1902, kaj kiam vi ĝin vizitas, vi ĉiam havas ŝancon renkonti eminentajn Esperantistojn, kaj britajn kaj forajn.



**The London Esperanto Club** meets every Friday at the Irish Centre in Camden Square. The programme starts at 7.15pm, but there is a chance to get together for an informal chat in the cosy bar beforehand.



The London Club was founded in 1902, and when you visit it you always have a chance of meeting eminent Esperantists, both British and from abroad.

www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

# La Orienta Esperantista federacio

*La somera pikniko de la federacio okazos ĉe la Foulness Heritage Centre* ***dimanĉon la 6an de septembro.*** *Renkontiĝo estas ĉe la stacidomo Shoeburyness la* ***11.30 atm.***

**Portu propran manĝaĵon por dividi kun aliaj**

http://www.greenrats.org.uk/oef.htm

## Internacia Amikeca Renkontiĝo

**The Friars, Aylesford, Kent**

**9a ĝis 12a de oktobro**
***(aŭ parto de la semajfino)***



Por aliĝilo kaj pli da detaloj kontaktu:

Anica Page, 7 Hampton
Great Holm, Milton Keynes
MK8 9EP
Tel: 01908 564004